

*Leteroj de Eugène Adam aŭ Lanti al Edmond Privat*  
*kun komentarioj de Pierre Hirsch*  
3-a kajero de la kolekto *Studoj* de Kultura Centro Esperantista  
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 541, 1974.02.20 & 23

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En la biblioteko de la urbo La Chaux-de-Fonds troviĝas la arkivo de Edmond Privat kaj grava interlingvistika arkivejo : Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia. En tiuj arkivejoj estis retrovitaj 9 ĝis nun nekonataj leteroj de Eugène Adam aŭ Lanti. Ok el tiuj leteroj estis publikigitaj en aprilo 1973 en la tria kajero de la kolekto *Studoj* de Kultura Centro Esperantista.

A.- Titolo de tiu kajero : *Leteroj de Eugène Adam aŭ Lanti al Edmond Privat kun komentarioj de Pierre Hirsch.*

Cl.- En tiu kajero Pierre Hirsch, post klarigoj pri la malkovro de tiuj leteroj, prezentas la personecon de Eugène Adam kaj Edmond Privat. Kaj li diras, ke « *kio ligis Adam kaj Privat, tio estis la konvinkigo, ke Esperanto helpus venki kaj eĉ detruu la ŝovinismajn antaŭjuĝojn kaj kontribuus starigi veran pacon.* »

A.- La unua retrovita letero atestas, ke la rilatoj Adam-Privat jam ekzistis antaŭ januaro 1920. Ŝajnas, ke ili povus laŭdate koincidi kun la reviviĝo de la gazeto *Esperantista Laboristo* en aŭgusto 1919. Pierre Hirsch faras eĉ la hipotezon, ke « *estas konjekteble, ke Edmond Privat kaj Eŭgeno Adam renkontiĝis en Parizo en 1915, dum la periodo kiam Privat vizitis rondojn de pacistaj laboristoj, sindikatistoj revoluciaj kaj anarkiemaj, kiaj Pierre Monatte kaj Alfred Rosmer.* » Al la historiistoj la devo kontroli ĉu tio estis ebla aŭ ne ?

Cl.- En la unua letero (januaro 1920) Eugène Adam skribas al Edmond Privat : « *Viaj leteroj estas por mi ĉiam kuraĝigaj.* »

A.- Legante tiujn 8 leterojn oni rimarkas, ke Lanti estis ne nur en tre intimaj rilatoj kun Edmond Privat kaj lia amiko Hector Hodler, sed ke li trovis en tiuj du amikoj konsilantojn kaj inspirantojn.

Cl.- En tiu periodo oni troviĝis en kriza situacio. Ni legas : « *Tie-ĉi en Parizo, en niaj antaŭemaj medioj, ne estas eble ignori la Idistojn. Ili okazigas kontraŭdirajn kunvenojn kaj se la Esp[erantistoj] ne venas kontraŭdiri, il[i] [la idistoj] klaĉadas ĉie kaj laŭte : « Ha ! kompreneble la Esp[erantistoj] ne venis defendi Esp[erant]on : ĉar ĝi ne estas defendebla.* »

A.- Eugène Adam partoprenas tiujn kunvenojn por defendi Esperanton. Sed Edmond Privat konsilas al li forlasi la teoriajn diskutojn por pli efika laboro. En februaro 1920 Eugène Adam skribas : « *Tial ke, malavare kaj kuraĝige vi interesiĝis pri nia ĵurnalo, mi sentas min en plena fido por iom senĝene babili kun vi.- Dankon pro via bonintenca konsilo pri dezirinda forlaso de teoria diskutado. Tia konsilo alvenas ĝustatempe kaj pruvas al mi ke malgraŭ foreco ni tute juĝas same pri propaganda vidpunkto. [...] Nun ni eniras novan fazon de propagando. Ni forbalais la idistan kampbatalon ; ni okupis tre bonan pozicion de kie ni direktos nian antaŭenpuŝon por konverti la socialistaron.* »

Cl.- Tiuj diroj respegulas la akrecon de la tiamaj luktoj inter la esperantistoj kaj idistoj. Tiu letero estas ĉefe interesa pro tio, ke ĝi malkovras la malfacilaĵojn, kiujn Eugène Adam devis alfronti en la eldonado de la gazeto *Esperantista Laboristo*. Aŭdu :

A.- « Vi trovos [...] recenzon tro longan de M. Elbo (Marcel Boubou, instruisto, tre favora kaj malavara por nia ĵurnalo). [...] Mi ne povis rifuzi tiun recenz-artikolon. [...] La tasko de ĵurnal-mastrumanto ne estas ĉiam facila. Mi devas elekti inter diversaj pressendaĵoj kaj okazas malkontentoj pro la neenpresitaj artikoloj. Neeble kontenti ĉiujn artikolendintojn. Kaj ni devas precipe zorgi kaj klopodi pri la materia vivo de l' ĵurnalo ! [...] La preskostoj estas ĉiam pli altaj. La baldaŭa plialtiĝo de la afrankoj estas timiga por mi. Ni tamen penos por trapasi tiun malfavoran pasajon. La penso ke Sro Archdeacon

Cl.- Ernest Archdeacon estas la fondinto de la aŭtomobila klubo de Francio. Li estis Esperanto-mecenato.

A.- *La penso ke Sro Archdeacon havas 25.000 fr en poŝo kaj donas al ni nenion iom kolerigas min. »*

Cl.- Kiel vi konstatas, tiuj leteroj kaj ties komentarioj de Pierre Hirsch alportas interesajn sciigojn pri la personeco de Eugène Adam aŭ Lanti.

A.- Ni ripetas, ke ili aperis en la tria kajero de la kolekto *Studioj* de Kultura Centro Esperantista.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!